Quant au Congrès mondial lui-même, il n'a nullement disparu : il s'est transformé en Congrès virtuel inclus dans le Festival, pendant une semaine début août. Plus de 2000 personnes de 97 pays y ont participé.

En plus des activités du Festival lui-même, y inclus le Congrès virtuel, d'autres organisations ont elles aussi organisé des événements d'une semaine sous les auspices du Festival, entre autres l'organisation de la jeunesse espérantiste TEJO et sa branche brésilienne, les congrès nationaux des associations d'espéranto d'Italie et des États-Unis ainsi que le congrès annuel de la Ligue internationale des enseignants espérantistes (ILEI). À cela s'ajoutent 42 événements d'une ou deux journées, dont des « journées » spéciales – la journée de l'Afrique, la journée de l'Amérique, la journée de l'Asie, la journée de l'Europe et la journée du Moyen-Orient et de l'Afrique du Nord, programmées à des heures convenables pour les fuseaux horaires concernés. C'est Fernando Maia Jr. (Brésil), vice-président de l'Association



**MONDAFEST'2020**  
LA MONDA FESTIVALO DE ESPERANTO  
20 JUNIO – 20 SEPTEMBRO

mondiale d'espéranto, qui a coordonné le programme. L'entreprise slovaque E@I, qui pratique l'espéranto, s'est chargée de la partie technique. La fondation nord-américaine ESF a apporté son soutien financier.

### Le Guide des Objectifs

La maison d'édition Mondial (New York) a fait paraître dernièrement au format papier un Guide des Objectifs de développement durable, accessible également sur le site [esperantoporun.org](http://esperantoporun.org). L'ouvrage contient 17 essais de spécialistes espérantistes de chacun des 17 objectifs identifiés par les Nations Unies en 2015, constituant son dénommé *Agenda 2030* – en quelque sorte, un plan de travail des Nations Unies pour la période 2015-2030. Édité à l'occasion de MondaFest', le festival virtuel d'espéranto dont le thème principal était « Les 75 ans de l'ONU », le guide ne se contente pas de donner aux espérantistes des informations de base sur les Objectifs, mais il contient également des suggestions et des idées sur comment il est possible de s'impliquer soi-même, d'impliquer des groupes locaux, des associations nationales et d'autres groupes d'espéranto.

« Si nous voulons attirer l'attention des Nations Unies sur la valeur internationale de l'espéranto, nous devons nous efforcer de prouver que nous ne faisons pas que parler, nous agissons », a dit Humphrey Tonkin qui, avec Rakoen Maertens, a rédigé ce Guide.



## Merci, Philippe Foubert !

Il y a quelques semaines une lettre inattendue est parvenue au siège d'Espéranto-France. Parmi les habituelles factures, commandes et adhésions se trouvait une lettre provenant d'une compagnie d'assurances nous informant que Monsieur Philippe Foubert, qui venait de décéder, avait désigné notre association comme bénéficiaire de son assurance vie.

Philippe Foubert était membre depuis plusieurs années et avait décidé de léguer de l'argent à Espéranto-France pour soutenir notre action en faveur de l'espéranto après son décès. Ainsi la compagnie d'assurances nous informait que plus de 30 000 € étaient prêts à être virés sur notre compte bancaire.

Peut-être certains d'entre vous s'étonneront-ils de lire qu'il est possible de faire une telle donation à Espéranto-France par l'intermédiaire d'un héritage, car nous avons déjà étudié cette possibilité il y a quelques années à la demande de certains membres qui souhaitaient soutenir l'association après leur décès. À l'époque, les possibilités d'héritage étaient très difficiles pour une association comme la nôtre. Mais la loi française a changé en 2014. Depuis cette loi sont habilitées à percevoir des legs les associations ayant plus de trois ans d'existence et dont les activités répondent aux critères définis dans l'article 200. 1. b du code général des impôts :

« Œuvres ou organismes d'intérêt général ayant un caractère philanthropique, éducatif, scientifique, social, humanitaire, sportif, familial, culturel, ou concourant à la mise en valeur du patrimoine artistique, notamment à travers les souscriptions ouvertes pour financer l'achat d'objets ou d'œuvres d'art destinés à rejoindre les collections d'un musée de France accessibles au public, à la défense de l'environnement naturel ou à la diffusion de la culture, de la langue et des connaissances scientifiques françaises. »



**Philippe Foubert** est décédé en juin 2020 à Saint-Jean-de-Liversay (Charente-Maritime), ville où il avait ses racines familiales et dont son père et son grand-père furent maires.

Né en juillet 1955 à La Rochelle, il a effectué l'essentiel de sa carrière à La Poste, notamment comme facteur, de 1978 jusqu'à sa retraite en 2010, d'abord dans la région lyonnaise, puis en Charente, avant de retrouver sa région natale près de La Rochelle.

Ayant découvert l'espéranto dans sa jeunesse, il a commencé à l'apprendre seul à l'aide du *Nouveau*

*Cours Rationnel*.

Au début des années 2000, il s'est inscrit au cours organisé par Alain-Michel Martzloff à La Rochelle, cours qu'il a fréquenté pendant plusieurs années. Il a participé à des stages à Kvinpetalo et à plusieurs rencontres espérantistes : célébration du centenaire de l'espéranto en Vendée (Luçon 2003), 59<sup>e</sup> congrès de SAT-Amikaro (La Roche-sur-Yon 2004)... Il a aussi visité plusieurs hauts lieux de la culture espéranto : Château de Grésillon, Musée International de l'Espéranto à Vienne (Autriche)...

Dans sa vie quotidienne, il utilisait l'espéranto de diverses manières : lecteur de livres et de revues (il était abonné à plusieurs revues, dont LME), il a entretenu pendant plusieurs années une correspondance avec une amie russe, et était un auditeur assidu de la webradio *Muzaiko*.

Membre des Citoyens du Monde, il possédait une carte d'identité en espéranto qu'il se plaisait à montrer, pour faire un peu de réclame, à la place de sa carte française chaque fois qu'il lui fallait prouver son identité. Il était aussi actif au sein du mouvement Europe Démocratie Espéranto, notamment en participant aux collages d'affiches à l'occasion de campagnes électorales.

Nous remercions cordialement Philippe Foubert et adressons nos plus sincères condoléances à sa famille.

## Apprendre l'espéranto en s'amusant avec Duolingo

Depuis juillet 2020, les francophones ont leur cours d'espéranto sur Duolingo.



Les cours proposés par *Duolingo*, sur le site web ou via l'appli mobile, sont basés sur un corpus de phrases à traduire dans un sens et dans l'autre, permettant aux élèves de découvrir la langue à l'aide d'exemples concrets. L'ensemble des phrases du cours ont été élaborées en suivant le Cadre européen de Référence des Langues (CECRL) afin de donner aux élèves la possibilité de s'exprimer sur des thèmes variés.

Pour chaque nouveau mot introduit dans le cours, plusieurs phrases sont créées et traduites par les contributeurs du cours, afin que l'élève puisse pratiquer le voca-

bulaire dans différents contextes. Chaque phrase en espéranto peut être traduite de différentes façons et la correction étant ensuite faite automatiquement par le système, les contributeurs doivent rédiger en amont toutes les réponses acceptables. Si l'équipe des cinq traducteurs bénévoles s'est creusé la tête pour trouver toutes les traductions possibles, il arrive encore, grâce à l'afflux des milliers d'élèves inscrits depuis le mois de juillet, de trouver de nouvelles variantes qui n'avaient pas été imaginées lors de la création du cours. En février 2021, déjà plus de 60 000 élèves étaient inscrits à ce cours.

<https://www.duolingo.com/enroll/eo/fr/apprends-espéranto>





## Bunta Esperantujo

### Malferma tago ĉe la CO de UEA – aprilo 2020

La **unua parto** de la prelegaro ekis en la jutubkanalo je la 9:30. Oni povis komune spekti kaj realtempe afiŝi komentojn, al kiuj povis reagi la prelegantoj mem.

La **dua parto** konsistis el realtempaj (vivaj) prelegoj fare de estraranoj kaj kunlaborantoj de UEA kaj TEJO per la platformo Zoom.

En la programo estis kelkaj **specialaj prelegoj** pri vegana manĝebleco, kafumado kaj teumado, kun la celo reprezenti la paŭzojn por tagmanĝo kaj kafo ĝuatajn dum la Malfermaj Tagoj. Fermis la programon **speciala retkoncerto de Kjara**, alirebla per la Facebook-paĝo de UEA:

<https://www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio>

Per mi ne scias kia miraklo mi (nula pri tiaj aferoj) sukcesis malfermi la zooman skatolon, havi bildon kaj sonon, kaj eĉ meti mesaĝojn en la konversacia apuda kolumno.

Mi tre ĝuis la prezenton. Kaj tio donas bonan esperon por pluaj virtualaj aranĝoj.

Unue mi ne bezonis vojaĝi tra ŝtopitaj vojoj, (malfacile) rezervi hotelon apud CO, kaj grimpi krutajn ŝtuparojn en la CO. Mi povis trinki teon (aŭ ion alian) kiam ajn dum la prelegoj. Kaj ririgardi iujn matenajn prelegojn iam ajn.

Mi tre ŝatis la prelegon de Marianne Pierquin. Unue, mi supozis, ke mi maltrafis ĝin, ĉar mi ŝaltiĝis al la afero malfrue matene. Sed ne, ĝi estis registrita, do neniuj problemoj rigardi poste!

Kaj aliaj preleg(et)oj, kiujn mi plej ŝatis: tiujn de Jeremie. Neniu malestimo al la aliaj prelegoj, tre interesaj kaj valoraj! Sed ni vidas Jeremie en lia medio, en lia propra korto, kun la vagantaj kokerikantaj kokoj de la najbaro... Tion ni ne havas, se li prelegus en la CO! Vere, ni (almenaŭ mi) tiam spertis la vivon en lia burunda medio. Valora enkonduko al aliaj kulturoj.

Mi esperas, ke el ĉio ĉi venos inspiro por pluaj virtualaj kunvenoj, fekunda grundo por evoluigo de nia agado. Ĝi estu inspira por i.a. la virtuala ĉi jara festivalo. Sukceson al la estontaj virtualaj eventoj!

Claude Nourmont



Jérémie Sabiyumva parolas pri teo kaj kafo el Burundo

ludlisto de la Malferma Tago - Aprilo 2020 :

[https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CPxaY4q1IZnVdwXUJ3\\_mER-](https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CPxaY4q1IZnVdwXUJ3_mER-)

## raporto el Afriko



## En Afriko nuntempe

Karaj legantoj, Preskaŭ ĉiuj landoj en la mondo kaj aparte en Afriko nun estas en embaraso, fronte al la sociaj kaj ekonomiaj perturboj kaŭzitaj de la malsano de kovim-19. Sed ambaŭflanke la repliko organiziĝas, kaj la respondoj tiom ekonomiaj kiom politikaj de la ŝtatoj helpas certigi iompostioman reziston kontraŭ la pandemio.

La afrika Esperanto-movado daŭre montras ian vigecon, danke al malgrandaj iniciatoj de la membroj de la Afrika Komisiono kaj de lokaj esperantistoj. Klopodoj estis faritaj nun ankaŭ por ne perdi la kontakton kun la enkontinentaj aktivaj esperantistoj, konsciigi afrikanojn

individue kaj kolektive pri la koronvira malsano kaj ilin instigi daŭre respekti la higienajn kaj kontaktajn limigajn dispoziciojn por ke la verda flamo ne estingiĝu komplete en Afriko dum tiu monda santragedio. Krome, la afrikaj samideanoj ne atendas, kaj ili komencis pretigi la venontajn defiojn sur sia kontinento rilate al Esperanto-renkontiĝoj. Mallonge, la ĉi-nova numero de la bulteno prezentas kelkajn movojn de la afrikaj e-istoj, iliajn konstantajn dezirojn pri Esperanto en la kontinento kaj ankaŭ raporton pri la inundoj lastatempe en Uvira, DR Kongo. Bonan legadon kaj zorgu bone pri via sano!

La redakcio  
(Esperanto en Afriko, n°41, 2020-2)

Ligilo al la revuo:

<https://www.esperanto-afriko.org/Eesperanto%20en%20Afriko%20n-ro%2041.pdf>

Afriko kadre de la *Monda Fest' 2020* de UEA

**L**a *Tago de Afriko*, okazinta la 23-an de aŭgusto 2020 kadre de la *MondaFest'* de UEA dum ĉ. 7 horoj, estis la plej granda virtuala E-evento iam ajn okazinta en Afriko. 131 homoj el 46 landoj de 4 kontinentoj oficiale aliĝis al la kongreso: 18 afrikaj landoj, 16 eŭropaj landoj, 6 aziaj landoj kaj 5 amerikaj landoj.

Ĉio komenciĝis per vivaj kantoj de burundaj infanoj el la infangardeno «Espero» sub la gvido de Gilbert Niyukuri, kaj kunspekto de kantoj de Joël Muhire. La oficiala malfermo okazis per prezento de la programo kaj la libreto pri la Afrika Tago fare de Adjévi Adjé. Sekvis bonveniga mesaĝo de Costantine Mashauri nome de Afriko, muzikaĵo de la grupo Konga Espero, salutvortoj de la vicprezidanto de UEA Fernando Maia Jr., mallonga prezento de la membroj de la Afrika Komisiono kaj parolado de Jérémie Sabiyumva, estrarano de UEA pri Afriko.

Sekvis mallonga prezento de agadraportoj: el Burundo de la prezidanto Aimé-Patrick Manirakiza, Ganao de Alfred Kobina Arthur, Benino pri la agado de la NRO SSB de Mireille Grosjean, Gvineo de Alpha Ahmed Diallo, Madagaskaro de Rasoharinaivo Mioranantenaina, Kameruno de Nguefack Zedong Chamberline, Senegalo de Lafi Charles Diatta kaj Assane Faye, Tanzanio de John E. Magessa kaj fine video-raporto de la Afrika Komisiono.

La alia parto estis same riĉa kaj alloga. Byelongo Elisée I., per sia prezento pri la svahila lingvo instigis vigan interbabiladon ĉe kelkaj ĉeestantoj, sed pro manko de tempo la interesatoj pri la temo ne povis sufiĉe komenti ĝin. Necesis tuj montri la 9-minutan reklam-filmon de John E. Magessa pri Tanzanio (<https://mallonge.net/65>), ĉe kies fino seninterrompe prelegis Apélété

D. Agbolo pri la evea. Menciindas, ke intertempe okazis ankaŭ prezento de popola danco el Burundo. Eblas ankoraŭ spekti tiun folkloradon el Burundo per <https://mallonge.net/64>.

Ĉe la sama jutubo-kanalo kuŝas ankaŭ aliaj materialoj montritaj dum la Tago de Afriko. Sekvis la afrika forumo, dum kiu estis kolektitaj demandoj, proponoj por pli efika funkciigo de la Afrika Komisiono. La tago atingis sian sukcesan kulminon, kiam Costantine Mashauri prezentis Tanzanion kiel potencia lan gastiglandon de la UK. Mallonge, oni esperas, ke la UK 2024 povos okazi en Afriko kaj ke ĝis tiam la tuta terglobo inkluzive la afrikajn landojn estos pli bone sendrate retkovrita ol nun, tiel, ke la ne-vojaĝemaj esperantistoj povos ankaŭ de sia loĝloko virtuale partopreni tiun UK. La Tago de Afriko fermiĝis per la dankoj de la estraranoj de UEA al la organizantoj kaj ilia subteno al la afrika movado.

(el Afrika bulteno 42)





## Esperanto en lernejoj

### Okazis la 7-a Esperanto-Semajno de la elementa lernejo Baiyangshujie en Taiyuan

Inter la 16-a kaj 20-a de decembro okazis la 7-a Esperanto-Semajno de la elementa lernejo Baiyangshujie en la urbo Taiyuan de la provinco Shanxi, norda Ĉinio. Temis pri “ĉina spirito, monda rigardo”. Dum unu semajno okazis diversaj eventoj pri Esperanto por pli ol 1 500 lernantoj, instruistoj kaj gepatroj.

La malferma ceremonio konsistis el tri partoj: retrorigardo al la antaŭaj Esperanto-semajnoj, disdonado de Weilun-stipendio kaj arta prezentado. Profesoro Li Weilun de la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato estis invitita partopreni la eventon de la lernejo en julio. Li estis kortuŝita de la Esperanta etoso en la lernejo kaj decidis donaci 40 000 juanojn (= 5700 usonaj dolaroj) ĉiujare kiel Weilun-stipendion por subteni Esperantan lernadon kaj aktivadon en la lernejo.

Dume, okazis la tagmeza radio-elsendado *Voĉo de Esperanto*, nedeviga kurso de Esperanto, Esperanto-ekspozicio kaj interagoj. Krome, okazis prelegoj, kiujn faris profesoro Gong Xiaofeng (Arko) de Nanchang-a Universitato kaj sinjorino Yu Jianchao, prezidanto de Pekina Esperanto-Asocio. La prelegoj allogis ĉirkaŭ 700 gepatrojn kaj instruistojn, kio helpis ilin pli bone koni la lingvon. La gepatroj esperas, ke iliaj infanoj konos kaj lernos Esperanton.

El Popola Ĉinio



## raporto el Afriko

### Uvira kiel fekunda grundo por la verda semo

En la lastaj jaroj pro la fakto, ke la lokaj e-istoj emas sindoni en la vola laboro por disvastigi Esperanton surloke, la urbo Uvira pli kaj pli fariĝis tre preferata Esperanto-urbeto en la oriento de DR Kongo. Spite de la daŭranta malsekureco en tiu landparto, la esperantistoj de Uvira unuanime, ankaŭ brave dediĉas siajn tempon kaj energion por disvastigi la lingvon Esperanto. Rezulte Uvira estas nun urbo kun kelkdekoj da Esperanto-parolantoj, el kiuj estas precipe junuloj kaj infanoj. La urbo estas fakte fekunda movadkampo, pri kiu la konga landa asocio DKEA povas forte kalkuli.

En Uvira Esperanto havas dinamikan soklon, sur kiu la junaj sindonemaj esperantistoj klopodas ĉiam pli vigligi la Esperantomovadon. Nun ekzistas pli ol kvin Esperantoklubo tra la urbo danke al la aktivemo de pluraj lokaj fortoj. La instruemo, kiun havas esperantistoj en Uvira grandparte, kontribuas al multnombro de esperantistoj en Esperantujo. Ili foje eĉ uzas siajn proprajn etajn rimedojn por lui klasĉambrojn, aĉeti kretojn kaj pagi veturadon al Esperanto-kursoj. Ili ĉiam strebas pluvivigi kaj disvastigi la lingvon tra la tuta urbo en la limo de siaj ebloj. Ĉiumonate naskiĝas novaj esperantistoj, kiuj ekreginte la lingvon, siavice komencis instrui ĝin al neesperantistoj.

Uvira-esperantistoj ankaŭ aktoris kaj entute eldonis preskaŭ profesinivele jam 3 filmojn en Esperanto, nome: *Infanaj rajtoj*, *Dank' al la lingvo* kaj *Vengemo*.

Tiu ĉi lasta estas spektebla en jutubo per la ligilo:

<https://www.youtube.com/watch?v=DhnXZriYVKE&t=395s>

(el Afrika bulteno 41)



Espoir Ngoma Kasati (meze) kun la gelernantoj dum ekskurso

# Azia revuo – nova nomo, nova redaktoro

Aperis la numero 110 de *Esperanto en Azio kaj Oceanio* la bulteno de la Azia-Oceania Komisiono de UEA. La numero estas relative mallonga (24-paĝa) kun kontribuoj el 8 landoj en Azio kaj neniuj el Oceanio. Ĝi enhavas precipe raportojn pri eventoj okaze de la Zamenhofa Tago kaj en la lastaj 2-3 monatoj de la jaro 2020. La bultenon malfermas la redakcia artikolo titolita “La jaro 2020 ja estis bona jaro por ni.”

Klaku tiun ĉi ligilon por legi kaj alŝuti la numeron. Vi povas legi ankaŭ la antaŭajn numerojn ĉe [esperantoazia.net/index.php?mid=bulteno](http://esperantoazia.net/index.php?mid=bulteno).

La enhavo de la koncerna revuo montras abundan agadon:

|                   |                                                                                    |
|-------------------|------------------------------------------------------------------------------------|
| <b>Internacie</b> | La 38-a Komuna Seminario en Koreio okazis virtuale, ĉi-foje pli komune             |
| <b>Indonezio</b>  | Indonezio daŭre elstaras en reta agado                                             |
| <b>Filipinoj</b>  | Reta, pli inkluziva Z-taga festo                                                   |
| <b>Vjetnamio</b>  | Memorinda: Z-tago en Vjetnamio                                                     |
| <b>Koreio</b>     | Diversaj bonaj novaĵoj el Koreio                                                   |
| <b>Japanio</b>    | Zamenhof-tago: perspektive de loka grupo                                           |
| <b>Ĉinio</b>      | ĈEL okazigis Seminarion de Ĝeneralaj Sekretarioj (AMO-71 de UEA) kaj aliaj novaĵoj |
| <b>Pakistano</b>  | Jara Kongreso de Pakistano sukcesis malgraŭ limigoj de la pandemio                 |
| <b>Irano</b>      | Rikolto plena aŭtuno por la irana movado                                           |
| <b>KAOEM</b>      | Ligiloj                                                                            |

Ni ne povas republikigi ĉion ĉi tie. Specimene, ni aperigas la raporton pri la Z-Tago en Vjetnamio.

## Memorinda Z-tago en Vjetnamio

Cele al la Zamenhofa monato kaj resumado por la jaro 2020, en belvetera dimanĉo, la 6-an de decembro Hanoja Esperanto-Asocio (HanEA), kunlaborante kun Vjetnama Esperanto-Asocio (VEA) kaj Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO) organizis Bilancon 2020 kaj Zamenhof-tagon.



Nguyen Thi Phuong Mai



Albert Stalin Garrido

Neordinare, ĉi-foje oni festis tiun eventon ne en Hanoj-centro, sed ekstere. La loko situas ĉirkaŭ pli ol 30 kilometrojn for de urbocentro, ĉe bela, larĝa, florplena ĝardeno-restoracio kiu nomiĝas “Mangopino.” Speciala kaj memorinda evento estis, ĉar dum la tuta jaro 2020, pro diversaj kialoj, ĉefe pro la influo de la kronviruso, vjetnama esperantistaro preskaŭ ne povis grupiĝi: kelkaj partoprenis nur en kelkaj enlandaj kaj eksterlandaj Esperanto-kunvenoj per Zoom. Tamen, ĉi-foje, sentante ke la sekura situacio en Hanojo estas taŭga por fizike kunveni, organizantoj preparis interesan, enhavoriĉan programon. Pli ol 100 personoj partoprenis en la Zamenhofa tago en Hanojo, inkluzive de esperantistoj loĝantaj en Hanojo kaj iliaj familianoj, karuloj, gastoj, kaj ankaŭ delegitoj de la Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj (VUAO) kaj la Hanoja Unio de Amikecaj Organizoj (HUAO). Estis ankaŭ unu eksterlanda gasto, kiu partoprenis, nome s-ino Juliana Vas-Szegedi el Hungario.

La programo estis ĝoja, viglega tuj de la komenco per arta programo gvidita de la E-Societo. Post afabla parolo de s-ro Nguyen Van Loi, la prezidanto de VEA, pri la signifo de la Zamenhofa tago, ĉiuj starante, respektante, kaj serioze kune kantis la vjetnaman nacian himnon kaj ankaŭ la esperantan himnon *La Espero*. Plej grava parto estis la prelego de s-ino Nguyen Thi Phuong Mai, la prezidantino de HanEA, pri tutlanda Esperanto-agado en la jaro 2020, rezultoj gajnitaj, kaj pri la planoj por la jaro 2021 de la vjetnama esperantistaro.

Ĉi-okaze, tri novaj societoj kun junaj komencantoj sin prezentis kaj aliĝis kiel oficialaj novaj membroj de HanEA. Delegitoj de VUAO kaj HUAO laŭvice parolis kaj gratulis al la Esperanto-asocioj pro la bona kaj utila paŝo, ke HanEA fondis KK, komunan Esperanto-kunvenejon ĉe la oficejo de la jurista firmao APRA, kaj promesis multflanke subteni kaj helpi al nia asocio pri ĉiaj agadoj dum la venonta jaro.

Multaj gratulatestiloj estis disdonitaj al la plej aktivaj grupoj kaj membroj de la asocio. Diplomojn pri la novembra *Sumoo* (organizata de Hori Jasuo el Japanio) ankaŭ ricevis 8 vjetnamaj venkintaj “luktistoj.” Poste, okazis tre interesa programeto pri Esperanto-vortludoj, dum kiu aro da premioj estis disdonitaj al tiuj, kiuj donis ĝustajn respondojn.

Bongusta bankedo kaj komunaj fotoj fermis tre emociigan feston. Enbusiĝante kaj revenante al la urbocentro, ĉiuj senĉese kantis, iom laciĝis tamen sin kontentigis.

Ha Nguyen



renkontiĝo en Ĵuraso

# La 6-a Esperanto-staĝo en Metabief

La aranĝo okazis de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto 2020 en montareca pejzaĝo de ĵurasa regiono en la vilaĝo Metabief proksime de la svisa limo. La aranĝon organizas la klubo de «Esperanto Chalonnais» sub la gvidado de Anne-Marie Ferrier jam la sesan fojon. Tiu ĉi jaro estos memorata kiel la jaro de tutmonda pandemio Kovim-19 (kronvirusa malsano 2019).

Ni loĝis en montara junulara gastejo Les Sapins de l'Amitié (La abioj de Amikeco), kiun prizorgas la asocio Claj (Clubs de loisirs et d'action de la jeunesse). La direktoro Djemel Zeffane afable bonvenigis nin kaj donis informojn pri la domo kaj pri la striktaj kondiĉoj pro la Kronviruso. Ni devis uzi maskojn, krom dum la manĝado kaj dum la instruado. Ekster la domo estis laŭvola uzado de ili.

La unua vespero komenciĝis per la bonveniga aperitivo kaj poste sekvis prezentado de la ĉeestantoj. La aranĝon partoprenis dudek tri geesperantistoj el Francio kaj unu el Svislando. La programo konsistis el matenaj kaj antaŭvesperaj E-kursoj, posttagmezaj ekskursoj al diversaj lokoj kaj la vesperoj estis dediĉitaj al prelegoj aŭ ludoj. Per diversaj ekskursoj la partoprenantoj povis malkovri interesan regionon, promeni en la ĉirkaŭaĵo, bicikli al diversaj partoj en tiu angulo situanta proksime al Svislando. Agrablaj por rigardi estis matenaj sunleviĝoj, vesperaj sunsubiroj kaj unufoje eĉ ĉielarko beligis la horizonton.

Plej fluajn parolantojn Renée Triolle instigis al legado de diversaj tekstoj kaj sekvis diskutado. Ni traktis diversajn temojn: pri rubaĵoj, kafo, topinamburo, pandemio, atomcentraloj, sekreta vivo de lavmaŝinoj, Marjorie Boulton, judoj kaj holokaŭsto, indiĝenaj lingvoj en Sudameriko, mikrokreditoj, ktp. Ne mankis iom da gramatika ekzercado. Luc Allemand kaj Jacqueline Poux gvidis kurson por progresantoj. Libroservo proponis E-librojn. Andreo Grossmann prezentis kajerojn de TAKE pri konstruado.



Foto: Floréal Gabalda

Post la bona kaj abunda tagmanĝo ni povis elekti diversajn ekskursojn. Interesa estis vizito de la mezepoka kastelo Fort de Joux transformita al fortikaĵo. Ĝi havas la plej profundan puton (120 metrojn) en Eŭropo. Ne malpli interesa estis vizito al grotoj de Vallorbe, situantaj en Svislando. La kavernoj estiĝis pro la subtera elfluo de Orbe el la lago de Joux. En Svislando ni vizitis ankaŭ la muzeon Baud de mekanikaj muzikiloj. Kelkaj el ili estas veraj unikaĵoj.

Alia interesa vizito gvidis nin al la fromaĝejo Marcel Petite. Fort Saint Antoine estas malnova militfortikaĵo transformita al kelo por maturigado de la fromaĝo Comté. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj fromaĝoj. Impresis altaj stokoj da plurkilogramaj fromaĝ-diskoj. Feliĉe la laboro estas aŭtomatizata.

En la «Domo de la rezervejo» sur areo je 500 m<sup>2</sup> estas instalitaj interagaj ekspozicioj dediĉitaj al faŭno kaj flaŭro de la ĵurasa montaro. En proksimeco oni povas promeni ĉe la lagoj de Remoray kaj de Saint-Point, kiuj estas bone rimarkeblaj el belvidejo en alteco je 940 metroj. Kelkaj el ni biciklis al pli foraj lokoj. En Metabief ni vizitis fromaĝejon de Mont d'Or, kie oni

povas aĉeti diversajn fromaĝojn kaj aliajn regionajn produktaĵojn.

Ĵaŭde ni havis la plezuron akcepti viziton de Mireille Grosjean kun amikino ŝia. Mirejo regalis nin per ĉokoladaj bomboj «Merci». Venis ankaŭ du instruistoj: Emmanuel Desbrières kaj Alexandre André. Ili instruas en francaj lernejoj kaj rakontis al ni pri siaj spertoj pri enkonduko de Esperanto, pri interŝanĝoj kun aliaj lernejoj kaj pri vojaĝo kun lernantoj al Slovenio.

Vespere Renée Triolle prelegis pri la interesa vivo de Victor Lebrun, kiu estis franca esperantisto kaj iama sekretario de Leo Tolstoj. Alia ŝia prelego temis pri famaj virinoj en Esperantujo. Luc Allemand rakontis kaj per bildoj ilustris sian vojaĝon per biciklo ĉirkaŭ la Nigra maro. Alian interesan (kvarmonatan) vojaĝadon per ĉevalo prezentis Nathalie Rigault. Ni ankaŭ ĝuis ludadon de liro fare de Luc Allemand.

Post longa tempo sen fizikaj E-renkontiĝoj ni povis ĝui agrablan semajnon en bona familia etoso.

Liba Gabalda

# Universitata publika agado en Turkio

**K**adre de la prezenta serio de *Simpozio pri Kultura Memoro* organizita de Esplorcentro pri Historia kaj Kultura Heredaĵo de la Universitato Hacettepe (HÜTKAM), okazis frue en februaro informplenaj prezentaĵoj:

- D-ro kaj universitata preleganto s-ino Başak Aray faris prezenton pri *Diskutoj pri Internacia Helplingvo* (ĉefe pri Esperanto)
- D-ro s-ino Pinar Sel faris prezenton pri *La historio de Esperanto en Turkio*.

En la prezento partoprenis preskaŭ 100 homoj, kiuj plejparte estis akademianoj. Ili estis malfermitaj al ĉiuj kaj daŭris preskaŭ 2 horojn en la turka lingvo pere de la platformo Zoom.

## Turka Stelo

Ĉiumonate aperas de kelkaj jaroj la bulteno *Turka stelo*. La redaktoro estas Vasil Kadifeli. Vidu <https://esperantoturkiye.wordpress.com>  
La revuo estas senpaga kaj malfermita al ĉiuj, sed se vi sendos vian retpoŝt-

adreson ni sendos la revueton en la komenco de ĉiu monato al via leterkesto aŭtomate. Tiel ni scios la nombron de niaj legantoj kaj ni ankaŭ povos sendi anonc-mesaĝojn al la tuta grupo.

## Tago de patrino lingvo

Ankaŭ en Turkio oni zorgis pri la tago de la patrino lingvo. Jen afiŝo realigita por tiu okazo:



## Revuo Irana Esperantisto

### Aperis la 35-a numero de la "Irana Esperantisto" revuo



Afiŝita en 05/01/2021 de Esperanto Türkiye

La revuo *Irana Esperantisto* decidis aperigi artikolojn en minoritataj lingvoj de Irano. En la aŭtuna numero aperis artikoloj en la araba kaj kurda lingvoj. Ambaŭ lingvoj estas vaste parolataj ekster Irano kaj antaŭe ne havis tiun ŝancon. Artikoloj por venontaj numeroj estas ege bonvenaj.

Oni povas havi la 35-an numeron de *Irana Esperantisto* revuo el la jena ligilo:  
<https://dl.espero.ir/revuo/IE-35.pdf>

## Instruado en Mongolio

### Saluton, karaj kunagantoj por disvastigi Esperanton!

Mi volas sciigi al vi ĉiuj ĝojigan informon. Laŭ mia opinio, nuntempe en la teknologia jarcento disvastigi Esperanton pli facilas ol antaŭe, ĉar nun en moderna tempo ĉiu homo/civitano/precipe gejunuloj uzas smartfonojn kaj poŝtelefonojn.

Jen ekzemplo de mia propra sperto: antaŭ du semajnoj mi ekkomencis ripete aperigi mez-ampleksan anonceton en la du apartaj tutlandaj anonc-gazetoj, kiuj estas nomataj "Шуурхай зар" [www.Shuurkhaizar.mn](http://www.Shuurkhaizar.mn) kaj "Зар мэдээ сурталчилгаа" [www.zarmedee.mn](http://www.zarmedee.mn) (ZARMEDEENEWS PAPER ĉe FB) pri ESPERANTO-KURSO por la mongol-lingvaj uzantoj de smartfonoj kaj poŝtelefonoj.

Mi provas instrui Esperanton helpe de smartfono el la fora distanco tra tuta Mongolujo, precipe por junaj gelernantoj emfazante, ke gelernantoj devas elŝuti apon de esperantaj literoj (= klavaron) el la PLAY STORE!

Tiuj du lokaj gazetoj aperigis mian anoncon pri Esperanto-kurso kaj aperigos ripete (trifoje) en venontaj semajnoj. Jen mia provo por instrui kaj por disvastigi Esperanton tra tuta Mongolio. Kaj ankaŭ tio estas unua provo de Esperanto-kurso helpe de smartfonoj per mesaĝoj.

Kaj mi volas scii, ĉu iu antaŭe aŭ nun provis similan agadon? Ĉu iu havas saman sperton?

[shuurkhaizar.mn](http://shuurkhaizar.mn)

Shuurkhaizar Шуурхай зарын сан

 **Shuurkhaizar.mn**



## Turneoj

# Sinteza raporto pri la turneo de Suzanne Roy

La unumonata prelegvojaĝo komenciĝis la 4an de januaro 2020 en Luksemburgo. Suzanne Roy poste veturis ĝis Belgio por viziti la klubojn en Liège, Antverpeno kaj Bruselo. La posta itinero okazis en Francio: Lille, Amiens, Paris, Hérouville, Saint-Malo, Rennes, Douarnenez, La-Roche-sur-Yon, Bourges, Châteauroux.

Ĉu la klubanoj de Bourg-en-Bresse, lasta etapo, akceptis ege la can preleganton pro tro da kilometroj, tro da restoracioj, tro da prelegoj, tro da ŝablonaj demandoj kaj respondoj, tro da turismo? Tute ne! Tute male! Ili atestis, ke Suzanne esprimis siajn viglecon, scivolemon, humuron kiel en la unua tago. Ju pli da etapoj des pli da energio kaj entuziasmo!

Naŭ el la 13 kluboj organizis publikan kunvenon kun proksimume 220 personoj (el ili 100 ne scipovis Esperanton). En Amiens, Suzanne prelegis antaŭ 50 geknaboj, de 9 ĝis 10 jaraĝaj. En Hérouville, la urba biblioteko (en kunlaboro kun la loka E-o klubo kaj asocio “Calvados Québec”) kaptis la okazon por organizi posttagmezon pri Kebekio kun interveno de dua preleganto pri historio de la unuaj normandaj migrintoj al Kanado, gustumado de kebekaj dolĉaĵoj, kaj eta koncerto. Pli ol 50 homoj ĉeestis la programon. En Douarnenez, Suzanne partoprenis lingvan kafejon.

Saint-Malo, Bourges kaj Paris ne sukcesis altiri ne-esperantistan publikon en sia publika kunveno. Lille, Rennes kaj Bruselo organizis aranĝon nur por lokaj esperantistoj. Esperantistoj venis de proksima Limousin por ĉeesti la prelegon en Châteauroux. La kluboj reklamis la aranĝojn en lokaj gazetoj aŭ sur sia Facebook-paĝo, ankaŭ en “Eventa Servo”. Radio France Bleue intervjuis Maryvonne Houvriez por reklami la publikajn kunvenojn en Bourges kaj Châteauroux. Tamen postprelegaj raportoj videble nenie aperis en la gazetaro.

Kiel unu el la ĉefaj organizantoj de la ĉi-jara Universala Kongreso en Montrealo, Suzanne prezentis ĝiajn turismajn aranĝojn, sed Liège bedaŭris, ke ties prezoj ne estis indikitaj.



Suzanne Roy en Luksemburgo. Foto: Brian Moon



Suzanne Roy prelegas dum la Novjara Renkontiĝo. Foto: Brian Moon

Kvazaŭ ĉiuj kluboj ankaŭ petis, ke ŝi prezentu la lingvan situacion en Kebekio kaj en Kanado. Tre ofte, la prelegoj okazis en la franca kun komparo kun la kebekaj.

Kiel atestis Antverpeno, kie la loĝantoj majoritate sin esprimas en la flandra, Suzanne ankaŭ faris “*bonan prelegon en alt-nivela Esperanto*”, “*tre interesa prelego*” (Bourges), “*ege interese, tre bona prelegantino, multe da demandoj*” (Châteauroux), “*ege plaĉis al la ĉeestantoj, ni eĉ devis haltigi Suzanne por manĝi ne tro malfrue*” (Bourg-en-Bresse), “*plaĉis al ĉiuj*” (Bruselo). “*bone preparita prelego, fotoj, sondosieroj pri la lingvaj niveloj. Tre bone regata temo*” (Lille).

Ni ne scias, kiom da ĉeestintoj finfine decidis aliĝi al U.K. post la interveno de Suzanne, sed ni certas, ke plej multaj el ili iom lernis pri la “Bela Provinco” kaj ĝuis tiun momenton kun multtalenta preleganto kaj afabla gasto (“*estis tre agrable gastigi ŝin*”, Luksemburgo). Dankon al vi, Suzanne!

## Lecionoj por venontaj prelegvojaĝoj

Luksemburgo, kiel unua etapo, ne povis organizi publikan kunvenon pro datoj tro proksimaj de la jarfinaj festoj. Samkiale, Liège (dua etapo) mistrakis kunlaboron kun profesoro pri lingvistiko pro ekzamena periodo. La elekto de alia periodo flanke de Suzanne ne eblis, ĉar ŝia turneo okazis tuj post jarfina aranĝo en Germanio, kaj estas efektive grave pripensi la turneajn datojn (la lernejoj ferioj en Francio ĝenerale okazas dum pluraj sinsekvaj semajnoj kaj ofte ĝenas por organizi senzigzagan itineron).

Amiens bedaŭris, ke la temo pritraktita ne kongruis kun la temo petita de la klubo. El tio, ni povas eble dedukti, ke la unua reklammesaĝo enhavu precizajn prelegtemojn kaj ke ĉiu klubo sufiĉe frue rilatu kun la preleganto por interkonsenti pri sia loka aranĝo (la turnea adresaro, adresita al la definitive elektitaj kluboj, ĉiam enhavas la retan adreson de la preleganto).

Yves NICOLAS



## La 14-a Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres

29.2.2020 - 7.3.2020

La lastan superjaran tagon de februaro, la belega hotelo kaj feriejo Val d'Esquière en Les Issambres akceptis centon da esperantistoj el diversaj landoj. Pro la kronvira malsano Covid-19, disvastiĝinta fine de decembro en Ĉinio en la urbo Wuhan kelkaj rezignis sian partoprenon. La viruso atingis Eŭropon en februaro kaj rapide disvastiĝis en pluraj landoj kaj poste furoris precipe en Italio. Pro ĝi okazis nekutima situacio: ĉe la alveno en aero ŝvebis nur flugantaj ki-soj sen ĉirkaŭbrakoj. Venis esperantistoj el Francio, Belgio, Hispanio, Svedio, Italio, Finnlando kaj Rusio. Kun Katerina Arbekova el la urbo Novosibirsk, (kiu gvidis pasintjare la E-kurson) venis grupeto da gejunuloj, kiuj kun granda entuziasmo ĝuis kaj praktikis Esperanton.

La direktoro de la hotelo, S-ro Sylvain Ceccoto, bonvenigis nin sabate antaŭ la vespermango per aperitivo kaj deziris al ni agrablan restadon. La feriejo proponis diversajn programerojn, kiujn ni povis partopreni: diversajn ludojn, arkopafadon, kvizon, malstreĉigan gimnastikon, loterion, minigolfon, ekskursojn, dancadon kaj aliajn amuzaĵojn.

Ankaŭ nia tutsemajna programo estis riĉa. Okazis kvar diversnivelaĵoj kursoj pri Esperanto. Komencantojn instruis Christine Graissaguel; tiujn, kiuj jam lernis kaj komprenas la lingvon gvidis

Elisabeth Ledru (Elinjo). Pli lingve progresintajn partoprenantojn paroligis Nina Korĵenevskaja, kaj por la plej spertaj Mikaelo Bronŝtejn pretigis varian programon: iom da gramatiko, kvizo, ŝercoj, kantado kun akompano de gitaro. Krome li donis al ni multajn informojn pri soveta Esperanto-movado kaj pri famkonataj rusaj esperantistoj. Ĉiuj kursoj agrable disvolviĝis, kaj la lernantoj estis kontentaj. Dum la paŭzoj Monique Prezioso kaj Simone Marlier pretigis kaj servis al ni kafon, diversajn infuzaĵojn kaj biskvitojn.

Oni vizitis la urbojn Fréjus kaj Roquebrune-sur-Argens. Iuj individue veturis al Saint-Tropez, kiu distancas nur dek kilometrojn de Les Issambres. Pro pluvo kaj forta vento la vizito al la lagetoj Villepey ne povis okazi. Tiam estis proponataj diversaj tabulludoj, kun la intenco pliprofundi la konon de Esperanto. Survoje laŭ la marbordo al la urbeto Biot, kie ni vizitis vitrofabrikon, ni admiris belan pejzaĝon. Agrable estis admiri la sunleviĝon ĉe la proksima haveneto de Les Issambres, kie la mevoj salutas kaj adiaŭas la spektantojn. Dum la libera posttagmezo ni povis ludi kartojn aŭ promeni en la ĉirkaŭaĵo. Ĉe la marbordo en salono Batterie estis interesa ekspozicio pri la aviadisto, esploristo kaj verkisto Antoine de Saint-Exupéry, kiu loĝis en la regiono. En la loka ĵurnalo *Var-Matin*

aperis artikolo pri nia aranĝo kun komuna foto.

Vespere ni ĝuis gitar-koncerton de Mikaelo Bronŝtejn, Nina Korĵenevskaja montris belajn bildojn de la pentristo Konstantin Vasilyev (1942-1976), kaj kun Nina Cvileneva ŝi prezentis al ni la urbon Ufa kaj ties folklorajn ensemblojn. Pri la urbo Volgograd prezentis filmon Tatiana Vtorova. Raïta Pyhälä rakontis pri la artisto Yrjö Saarinen kaj montris liajn pentraĵojn. Gunnar Olsson prezentis al ni bildojn pri sia kolekto de cent tri akordionoj. Ángel Garcia per filmo invitis nin al la ĉi-jara hispana kongreso, kiu okazos en la pitoreska urbeto Comillas proksime al Santander. Edmond Plutniak parolis pri "Eta Pollando en Norda Francio". Temas pri poloj invitataj enmigri Francion komence de la 20-a jarcento por labori en karbo-minejoj. Ni eksciis pri iliaj malfacilaĵoj, kutimoj, folkloro, kristnaskaj, paskaj kaj geedziĝaj festoj, pri dancoj, sporto, kuirarto. Li entuziasme rakontis pri ĉiuj interesaĵoj. Je la fino gaja muziko dancigis la ĉeestantojn.

Dum la adiaŭa vespero ĉiuj kursgvidantoj pretigis programerojn por distriĝo. Sonis kantoj kaj ni spektis amuzajn teatraĵetojn, skeĉojn, kvizon. Je la fino mi invitis la partoprenantojn al la fervojista kongreso okazonta en Frankfurto ĉe Odoro. Poste ni gratulis kaj pridonacis la kursgvidantojn kaj la organizantojn de la evento. Ne mankis kutima loterio kaj dancado kun akompano de akordiona muziko fare de la filinoj Prezioso.

Necesas danki al la organizantoj de la evento, al Christine Graissaguel kaj al la familio Prezioso, kiuj ĉiam estas pretaj helpi. Do, kun pacienco ni atendas novan inviton venontjare al tiu agrabla loko, kie floras mimozoj kaj kie oni bonege manĝas.

Liba Gabalda

Foto: Liba Gabalda



## Februare en KVINPETALO

**J**am en oktobro 2019 mi partoprenis, kadre de mia lernado post reveno al Esperanto, kurson en la Centro Kvinpetalo. Tiu kurso estis gvidata de Katalin Kováts. Pri tio mi rakontis en artikolo publikigita en la numero 604 de tiu ĉi revuo. Kaj la kurso, kaj la restado multe plaĉis al mi. Tiam mi eksciis, ke estos organizata komence de 2020 alia semajna kurso. Do mi tuj decidis denove partopreni.

Dum tiu semajno, kiu okazis je la fino de februaro, du malsimilaj kursoj estis proponataj :

- unu koncernis komencintojn kaj progresantojn, ĝin gvidis Catherine Kremer.
- la duan, “trianivelaj studoj” gvidis Brian Moon.

Do ĉifoje min akompanis mia edzino. Kiel mi, ŝi revenis al Esperanto en 2018. Pro manko de tempo, ŝi ne povas lerni tiom ofte kiom mi. Ŝi partoprenis la kurson por progresantoj kaj mi tiun, kiu temis pri la studprogramo de la triagrada ekzameno “Atesto pri Supera Lernado” de Franca Esperanto-Instituto.

Tamen, mia celo ne estis min prepari al tiu altnivela ekzameno sed nur plibonigi mian nivelon, perspektive al la aprila KER-ekzameno C1.

Tiun duan kurson 4 personoj partoprenis. Neniu celis la Ateston pri Supera Lernado.

Ĉiuj estis preskaŭ samnivelaj. Tio permesis bonan kolektivan lernadon.

Dum la du unuaj tagoj, la kurso temis pri tradukado de literaturaj tekstoj. El tiuj tekstoj, mi ŝatus mencii leteron skibitan de sinjorino de Sévigné al sinjorino de Grignan. Mi devas konfesi ke eĉ franclingve mi multe penis por kompreni la enhavon de tiu letero!

Por ĝuste traduki literaturon, oni devas enmergiĝi en la epokon, en la lokon, en la etoson de la verko. La tradukado de vorto al

vorto ĉiam igas aĉan rezulton. Estas arto (kiun mi tute ne posedas!) fidele traduki, respektante la ideojn kaj la spiriton de la originala verko.

Tiuj tradukekzercoj ne estis facilaj sed certe ege utilaj.

Dum la dua parto de la kurso, ni interesiĝis pri la esperanta literaturo. Kvar libroj kaj ilia aŭtoro estis la temo de tiu parto, ĉiuj libroj estas legindaj. Tiuj libroj estas: *La Bona Lingvo* de Claude Piron, *La Zamenhof-strato*, pri la vivo de L.C. Zaleski-Zamenhof, de Roman Dobrzyński, *Viktimoj* de Julio Baghy kaj *Ne ekzistas verdaj steloj* de Liven Dek.

Kvin personoj, ĉiuj progresantoj, partoprenis la alian kurson kiu konsistis el gramatikaj ekzercoj, diktaĵoj, legadoj, edukaj ludoj. Ĉiuj partoprenintoj multe ŝatis tiun kurson.

Dufoje dum la semajno, Brian kondukis nin al la vilaĝaj vidindaĵoj, el kiuj tipa tombejo, kastelo kaj belaj grandaj burĝaj domoj. Tiu ĉi vilaĝo, Bouresse, estas tute malgranda (nur kelkcentoj da loĝantoj) sed, tamen, troviĝas en ĝi diversaj vendejoj, restoracio, poŝtoŝtanco kaj eĉ kulturdometo. Tio estas nun malofta en francaj etaj vilaĝoj.

Dum la semajno okazis nia 50a datreveno de geedziĝo. Kompreneble, ni festis ĝin familie antaŭ kaj post la staĝo.

Por celebri ĉi tiun specialan eventon, ni kunportis du botelojn de nia loka kaj fama vino, ĉampano, kaj lokajn rozkolorajn kukojn “Biscuits roses de Reims”. Do, ni festis ĵaudon vespere. Ni ricevis donacojn de la grupo kaj Morine, unu el la partoprenintoj, kantis al ni belajn amorkantojn. Ĉi tiu amikega vespero longe restos en nia koro.

Paul Quevy-Lefevre



Foto: Brian Moon



## Nova estraro, novaj perspektivoj

**E**n 2020, pro la sana situacio, la membrokunveno planita en junio 2020 en Parizo estis prokrastita ĝis la 12a de septembro. Malkiel kutime, nur malmultaj personoj povis kunsidi en la pariza salono, do por la unua fojo, la plejmulto kunvenis rete.

La komitato estis parte renovigita. Ok membroj estis elektitaj aŭ reelektitaj por reprezenti la membrojn de la asocio: Alexandre André, Véronique Bichon, Bruno Flochon, Xavier Godivier, Vincent Jacques, Aleks Kadar, Emmanuelle Richard kaj Éric Streichemberger.

La postan tagon okazis – ankaŭ parte en la sidejo, parte rete – la unua komitatkunveno de la nova komitato. Nova estraro estis elektita:

Prezidanto: Bruno Flochon  
 Vicprezidanto: Maurice Juy  
 Kasisto: Jean-Lucien Mazeau  
 Vickasisto: Armand Salek  
 Ĝenerala sekretario: Emmanuelle Richard  
 Vicsekretario: Eric Streichemberger  
 Estrarano: Aleks André  
 Estrarano: Xavier Godivier

Ne eblis fari foton de la tuta estraro, tamen jen ekrankopio de la tuta estraro, farita dum la decembra estrarkunveno. Tiu kunveno okazis rete, kio estas kutima por tia kunveno.

La tuta listo de komitatanoj troviĝas ĉe  
<https://esperanto-france.org/administration>

**Le Conseil d'administration**

Le Conseil d'administration d'Espéranto-France se compose de :

- 13 représentants des membres individuellement réélects pour un mandat de 2 ans lors de l'assemblée générale annuelle,
- un représentant pour chaque association adhérente (délégation régionale ou association spécialisée)

**Il veille au bon fonctionnement de l'association dans le cadre des compétences définies en assemblée générale, ainsi qu'à l'élaboration des projets sociaux.**

| N° | photo                                                                               | nom                  | rôle                                                                     |
|----|-------------------------------------------------------------------------------------|----------------------|--------------------------------------------------------------------------|
| 1  |    | Alexandre André      | représentant des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France  |
| 2  |    | Véronique Bichon     | représentante des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France |
| 3  |    | Bruno Flochon        | représentant des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France  |
| 4  |    | Xavier Godivier      | représentant des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France  |
| 5  |    | Vincent Jacques      | représentant des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France  |
| 6  |   | Aleks Kadar          | représentant des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France  |
| 7  |  | Emmanuelle Richard   | représentante des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France |
| 8  |  | Eric Streichemberger | représentant des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France  |
| 9  |  | Jean-Lucien Mazeau   | représentant des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France  |
| 10 |  | Armand Salek         | représentant des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France  |
| 11 |  | Maurice Juy          | représentant des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France  |
| 12 |  | Éric Streichemberger | représentant des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France  |
| 13 |  | Véronique Bichon     | représentante des membres au Conseil d'administration d'Espéranto-France |

Ankaŭ legeblas rete la lumbildaro prezentita dum la membrokunveno, la jara raporto kaj la financa raporto:  
<https://esperanto-france.org/assemblee-generale-2020>



Reta kunveno de la estraro



**E**n oktobro kaj novembro 2020, Espéranto-France faris enketon celantan la membrojn de la asocio kaj ankaŭ ĉiujn interesatojn.

La demandoj estis la jenaj:

1. Kiujn servojn vi ŝatus, ke Espéranto-France proponu al la membroj?
2. Kiun agadprojetkon vi proponas?
3. Laŭ vi, Espéranto-France devas prioritare zorgi pri: komunikado al ekstera publiko kaj varbado / rilatoj kun la gazetaro / komunikado kun la membroj / agado ĉe UNESKO / produktado de instrumaterialoj / instruado pri kiel instrui Esperanton / instruado pri kiel komuniki al ekstera publiko / libroservo / eldonado de libroj
4. Ĉu vi havas aliajn proponojn aŭ deziras aldoni detalojn?
5. Ĉu vi pensas, ke utilis renovigi aŭ modernigi la logotipon de la asocio?
6. Ĉu vi pretas helpi kaj kiel?

Ni ricevis ne multajn respondojn, tamen ili estis sufiĉe interesaj por helpi nin prilabori pri nia agadplano. Ni tre dankas al la respondintoj.

La plej dezirataj servoj estas: disponigo de informmaterialo, retadreson, facile uzeblaj informadikaj iloj por la lokaj asocioj (retejo, dissendolisto, administrado de la membroj), adresaro de lokaj kluboj, pli efika reta butikoj, regulaj retaj kunvenoj, instruado pri kiel mastrumi retejon, komuniki tra sociaj retoj, verki artikolojn por Vikipedio, ktp., libroprunto.

Kelkaj el tiuj eblecoj jam ekzistas, aliaj estos baldaŭ disponeblaj.

La prioritataj taskoj estas, laŭ la respondintoj: informado, gazetaraj rilatoj, trejnado, instruado, eldonado. Malpli grava estas la politika premado.

Malmultaj homoj taksas la renovigon de la logotipo necesa.

## Jam disponeblas...

Ĉiu membro havas retadreson kiel

antaŭnomo.nomo@esperanto-france.org

Por pliaj informoj, bonvolu skribi al [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org)

Adresaro de kursoj, eventoj, lokaj kluboj estas en nia retejo <https://esperanto-france.org> en la parto «L'espéranto près de chez vous». Vidu detalojn ĉi-sube.

Libroprunto de libroj eblas en la sidejo.

## Baldaŭ aperos...

Nova reta butikoj, kiu estos facile uzebla kaj kiu uzos modernajn retajn ilojn.

Serio de retaj eventoj (jam okazis unu en decembro 2020 okaze de la Festo de Esperanto, kaj la venonta okazos en printempo 2021).

En la laborplano de Espéranto-France estas ankaŭ: organizo de kunvenoj pri strategio de niaj agoj pri kiel informi, instrui, ktp. ne nur por informi kiel fari sed ankaŭ por diskuti pri nia celoj; helpo al eldono aŭ reeldono de tradukitaj verkoj kaj helpo al produktado de originalaj verkoj.

la estraro de Espéranto-France

## Kiel uzi la adresaron de kursoj, eventoj, lokaj kluboj?

En la retejo de Esperanto-France ([esperanto-france.org](https://esperanto-france.org)), rigardu la parton **L'espéranto près de chez vous**.



Elektu la departementon en la listo, kaj tiam aperos listo de eventoj, kursoj kaj kluboj en tiu loko.

Fine de la listo estas butono, kiu ebligas al vi aldoni informojn pri la eventoj kaj kursoj en via departemento. Ekzemple:

> ENREGISTRER UNE NOUVELLE ACTIVITÉ DANS LE DÉPARTEMENT : VAR

Alklaku tiun butonon por aliri al la demandaro, kie vi povos registri informojn pri evento aŭ kurso.

Ni antaŭdankas al ĉiuj, kiuj uzos tiun ilon kaj tiel farigos ĝin pli efika kaj utila.

# Ĉiuj enskatoligitaj! Ĉu retkolibroj efike lukta kontraŭ Zumlaceco?

Jam de pluraj monatoj, ĉiu inter ni devas suferi la mankon de homaj rilatoj. Fakte, iom post iom, ni adaptiĝis kaj daŭre adaptiĝas al la situacio kaŭzita de la trudizoliĝo.

Dum la unua trudizoliĝo, komencita en marto 2020, mi same kiel multaj amikoj unue sentis konsternon. Ĉio en nia vivo haltis kaj ni devis trovi novajn manierojn labori, vivi kaj havi liberan tempon. Fakte ni ĉiuj havis ege pli da libera tempo ol antaŭe: ĉiuj rilatoj kun amikoj kaj diversaj tipoj de konatuloj tuj ĉesis. Ekde tiu momento, kelkaj provis transloki en sian personan vivon tion, kion ili jam spertis en profesia medio: la virtuala kunveno.

Dum la lasta printempo, ĉefe dum la trudizoliĝo de marto ĝis majo, ni spertis pli kaj pli da entrudiĝo de teknikaj rimedoj en ĉiujn partojn de nia vivo. Mi laboras sole kaj hejme jam de pluraj jaroj kaj jam estis al kutimiĝinta al retaj kunvenoj, ofte per GoToMeeting aŭ per Webex. Mi jam ankaŭ havis vidinteragojn per Skype aŭ per WhatsApp. Kaŭze de la trudizoliĝo, ni ĉiuj serĉis kiel efike vide interagi kun aliuloj. La ĉefa celo estis konservi kontakton kun familianoj, amikoj kaj diversaj konatuloj, ekzemple kun niaj Esperantaj grupoj. Ni provis diversajn ilojn: Facetime, WhatsApp, Skype, Jitsi... Kaj multaj fine uzis Zoom, Google Meet aŭ Microsoft Teams.

Unu el la efikoj de la sankrizo estas la plialtiĝo de la teknika nivelo de multaj homoj. Ĉar simplaj fizikaj naturaj interagoj ne plu eblas, multaj homoj, kiuj ne kutimis interagi per komputilo, ekuzis tiujn ilojn kaj nun sufiĉe bone regas ilin. Nun,

Zumkunvenoj iĝas parto de nia ĉiutaga vivo. Ni starigas ilin por multe da diversaj celoj: vidi familianojn sendepende de ilia vivloko, ĉu proksima ĉu sur alia kontinento, doni kursojn, diskuti kun amikoj pri diversaj temoj, sekvi prelegojn kaj debatojn, havi aperitivon, sekvi nudajn jogkursojn, debati kadre de diversaj asocioj, ktp.

Mi pli kaj pli al kutimiĝas interagi nur kun enskatoligitaj vizaĝoj.

En Esperantujo, se oni uzas «Eventan Servon», la retejon, kiu listigas multajn Esperantajn eventojn tutmonde, oni ofte vidas ĉirkaŭ dek retkunvenojn tage.

La afero iĝas tiel kutima por ĉiuj, ke JoMo nun kantas «Ĉu vi volas Skajpi?» anstataŭ sia kutima «Ĉu vi volas danci?»

Tiel granda propono de oportunecoj interagi kun aliuloj ŝanĝis kelkajn esperantistojn en retkolibroj! Same kiel la kolibroj, ili konstante kaj rapide flugas kaj flugas inter diversaj retkunvenoj. Ili estas tiel okupataj inter abundaj retkunvenoj, ke ili partoprenas en ili dum nur kelkaj minutoj, adaptas siajn kameraon kaj mikrofonon, salutas aliajn retkolibrojn, kiujn ili jam renkontis en diversaj kunvenoj pli frue dum la sama tago, kaj tuj foriras: ili volas tuj flugi al alia retkunveno!

Aliflanke, multaj homoj nun suferas pri Zumlaceco. Tiu malsano estas bone dokumentita, ĉefe de usonanoj. Retkunvenoj estas laciĝaj, ĉar oni devas esti ege pli koncentrita sur la bildoj kaj la sono ol kiam oni reale renkontas homojn. Krome, dum normalaj konversacioj, oni multe komprenas per la korpolingvo eĉ sen rimarki ĝin. Sur ekrano, oni vidas nur la vizaĝon, kaj ofte eĉ ne bone! Oni devas esti ege pli atentema por sekvi konversacion per retaj iloj. Kroma premo estas, ke per tiuj iloj, ni konstante vidas nin mem kaj pro tio zorgas pri niaj propraj vizaĝoj kaj aspekto. Tiuj interagoj estas pezaj por niaj cerbaj rimedoj. Fakte la retkunvenoj helpas nin travivi izoliĝan periodon. Sed la risko sperti Zumlacecon pligrandiĝas...

Thierry Spanjaard

Tiu artikolo aperis en *Esperanto-Provence* 123, vintro 2020-2021. Dankon al la redaktoro kaj al Thierry pro la rajtigo publikigi ĝin en LME.



# Bonvenon! Laŭra kaj Petro malkovras Esperanton

**N**e nur por junuloj, sed ankaŭ por ĉiuj esperantistoj aperis interesa libro, kiu en kelkaj paĝoj bonege prezentas la fundamentajn karakterizaĵojn de Esperanto. Temas pri bone elpensita rakonto, fakte aventuro de junuloj, kiu nuntempe okazas. Gefratoj rakontas kiel ili malkovris kaj lernis Esperanton, fondis klubon, kaj praktikas, travivas tiun vivsperton. Ĉu lernolibro?

Ne vere, tamen la pedagogoj certe trovos rimedojn por uzi ĝin dum kursoj de Esperanto.

Federico Gobbo, kiu instruas en universitato, estis invitita prezenti Esperanton en mezlernejo al junuloj inter 11 kaj 14 jaroj. Por ilustriti tion, mankas libro de la nuna epoko, do io nova, freŝa kaj moĝosa. La defio estis verki ion, kio montras trajtojn de la historio de Esperanto, elementojn de ĝia kulturo kaj kernojn de la humanismaj ideoj de Zamenhof. Tio ankaŭ ne estu teda, rigida kaj enua. Por plenumi tiun taskon Federico Gobbo konstruis interesan intrigon, situante ĝin en la nuna vivstilo de bitgeneracioj sen perdi la fadenon por sukcese atingi siajn celojn.

La rakonto estas bonege subtenata dank' al la profesia (kun)laboro de Yuri Gamberoni, juna komiksisto kaj amiko de Esperanto. Nigrablanke desegnitaj, la bildoj bone esprimas la sentojn de scivolemo, miro, ĝojo, pripensado, amikeco. Interesaj estas ankaŭ la desegnaĵoj, kiuj memorigas en la rakonto mem la esencajn paŝojn de Zamenhof verkanta Esperanton. Iomete pli granda ol A5-formata, la komikso mem ampleksas 50 paĝojn. La libro estas bela kaj agrabla, kaj aldoniĝas ankaŭ tri paĝoj de desegnoj de Gamberoni, kiuj povus eventuale inviti la leganton provi esprimiĝi per desegnoj.

Federico Gobbo klare enkondukas la libron. Sed kio unuavide ŝajnas iom stranga estas, ke li proponas fine de tiu verko interesan eseon, kiu respondas al la demando: Ĉu estas subkulturo en Esperanto? Sekve tiu libro estas ne nur

por komencantoj, sed ankaŭ por ĉiuj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri literaturo, komikso-arto kaj manieroj taksi la nunan efektivan ekziston de Esperanto. Tiu teksto de 11 paĝoj, estas ia "Esperanto en perspektivo".

Maloŭte oni legas tiom bonan studon pri la aktuala situacio de Esperanto. Ĝi celas, konsiderante la faktojn, konsciigi pri la intereso disvolvi la komikso-arton en Esperantujo.



Oni tamen rekomendu la libron al la junuloj por la komikso kaj oni invitu ilin legi la eseon iomete pli poste, kiam ili sufiĉe regos la lingvon!

La nocio de "subkulturo" ne implicas aĉigan prijuĝon, ali-dirite temas pri alternativaj vivostiloj al ĉefa vivstilo de preskribita socio, aŭ ia kontraŭ-kulturo, do aliaj manieroj konsideri, vivi, konsumi, ol tiuj de la plejmulto. La komikso-arto estas grava elemento de tiu rezistema subkulturo. Tradukojn de komiksoj kaj bildlibroj al Esperanto oni ofte eldonas. Originalaĵoj en Esperanto ekzistas, sed restas multo por fari, nome mankas originalaj mangaoj, tiuj tipaj japanstilaj komiksoj.

Konkludo de la eseo: "Komikso-arto estas la nuntempa plej bona kandidato por iĝi subkulturo de Esperanto, mankas nur iom da kuraĝo fare de la juna generacio por firmigi ĝin."

Bernard Behra

*Bonvenon! Laŭra kaj Petro malkovras Esperanton*  
de Federico Gobbo kaj Yuri Gamberoni  
75 p. 15 x 23 cm  
Eld. Mondial Novjorko  
ISBN 978-1-59569-383-9

## ESPERARTO

Freŝdate, mi kreis ESPERARTO-n ĉe Instagramo por publikigi miajn artaĵojn. Ĝi estas nur-Esperanta paĝaro (aŭ pli bone "artaro")!

Mi vin invitas malkovri ĝin: [instagram.com/\\_esperarto\\_](https://www.instagram.com/_esperarto_)  
La panda, verda kaj vera arto de l'espero kaj de... Esperanto!  
Nur Esperante  
[only/solo/seulement in/en #esperanto]  
#Zamenhof #art #panda #language  
[instagram.com/robinesc.art.go](https://www.instagram.com/robinesc.art.go)

Ĉiuj miaj artaĵoj estas videblaj senpage interrete. Baldaŭ, mi intencas krei paĝaron por donacoj (ebligi homojn, kiuj deziras, helpi min per libera mona donaco), sed ĝis nun, ĝi ankoraŭ ne ekzistas.

Robin





## Reĝino de simpleco

**J**ulio 2014: Hotelo Coroana (el la latina corona, krono), belege modernstila, en Braŝovo, Rumanio. Tie okazas la OSIEK-seminario, tiel bone organizita de Rodica Todor, kiu faciligas mian taskon de prezidanto de la asocio.

Julia malsupreniras la imponan ŝtuparon, kun sinteno de reĝino kaj samtempe simpleco de grandkora animulo. Estas la unua bildo kiun mi havas pri ŝi, kaj ĝi restos gravurita en mia memoro. Hungarino de Transilvanio, Julia vivis ĉefe en Cluj, ĝis sia geedziĝo kun alia verkisto, Filippo Franceschi, je 09 09 09! Li skribis al ŝi gratulleteron pri novelo aperinta en la revuo *Monato*: “Sep citronsemoj”, nun legebla en la reto. Ekkorespondado kaj do edziĝo, kaj ili vivis en la eta vilaĝo kie restadis Filipo, norde de Italio.

Julia: vere alloga personeco. Ĉar ŝi revis pri multe da gekorespondantoj, nur dekjaraĝa ŝi lernis Esperanton danke al amiko de la familio. Korespondantojn ŝi havos multe, el diversaj mondopartoj. Kaj kelkaj el ŝiaj lastaj libroj enhavos nur unu paĝon de ŝi, kiun ŝi petis al siaj korespondantoj traduki en sian lingvon. Tiel naskiĝos la bele eldonitaj tri D: Dialogo (2012), Doloro (2017), Dankon (2019). Ŝi klarigis en Antaŭparolo:

Pasintjare aperis en *Beletra Almanako* mia poemo “Dialogo”. Mia edzo tradukis ĝin en la italan. Poste du amikoj surprizis min sendante tradukojn en la hungaran kaj rumanan. Havante tri diverslingvajn versiojn, bizara ideo naskiĝis en mia kapo: aperigi libron kun mia poemo en multaj diversaj lingvoj... Mi skribis al pli ol 100 esperantistoj... Krom en la originala versio, “Dialogo” fine aperas en 52 lingvoj.

Riĉa je ideoj, ŝi kutimis ankaŭ fari demandojn al siaj korespondantoj, aŭ legantoj de ŝia revuo *Bazaro*. Ili rakontis facilan anekdoton, aŭ male memoraĵon plenan je profunda sento. Kaj jen la rezulto: Kiam mi estis la plej feliĉa en mia vivo?

Aŭ ŝi publikigis korespondadojn kun kelkaj elektitaj amikoj dum la jaroj 1959-1988. Ankaŭ tie la tekstoj ne estas de ŝi, sed tiuj de aliuloj: Ada Fighiera-Sikorska, senditaj el Bruselo, Varsovio, Rimini, ktp., Johannes Palu el Tallinn, Nikolao Danovskij el Moskvo, Stanislaw Janusiewicz, el Polando, Tibor Sekelj el Beogrado, Zagrebo, eĉ Novgvineo. En la sekva libro, Kvin geamikoj, eblas tamen malkovri ŝin laŭ la respondoj.

Sed ne kedu ke ŝi proponis nur liniojn de aliuloj. Ŝi verkis ekzemple: Mi ne estas Mona Lisa, Nomoj kaj Sortoj, Fronto kaj dorso, kiuj estas aro de noveloj ofte jam aperintaj en diversaj revuoj. Kun Filippo ŝi verkis dikan fikcian romanon: Libazar’ kaj Tero, kvarmana sonato dutonala, en kiu ia feino, Eluana, ir- kaj re-vojaĝas inter la du planedoj, por savadi malfeliĉulojn. Sekvis Kvodlibeto, kvarmana mikspoto dutonala (2015), ĉar kvodlibeto estas verko konsistanta el pecoj de diversaj fontoj, karakteroj.

Ŝi kreis Sudoku-enigmojn el literoj por la revuo *La Gazeto*. Ŝiaj noveloj ne ĉiam samvaloras, ne ĉiam plezurigas ĉiujn. Tio, kio karakterizas ŝin: simpleco de ofte ĉiutagaj temoj kaj de frazoj ĝenerale kurtaj, ŝajne naiva artmaniero, kontakto kun la na-

turo, eĉ inter la grizaj muroj de la Rumanio de antaŭ 1989, kie la ĉefoj havas ofte malagraban humoron. Amo al literaturo kaj muziko, el kio ŝi faras donacojn (vidu la rakonton *Donacetoj* en *Fronto kaj Dorso* p.98:

Treege malmultaj homoj konas la muzikinstrumenton Teremin. (Serĉu ĉe Google, klakante ‘theremin’ ! Auskultante ĝin, vi sentos ĝojon ‘diaregnan’.

Vortoj plej gravaj por ŝi: Amo kaj Paco, kiuj devenas de ŝia vasta koro kaj de la unitaria religio.

Mi prezentas aparte unu el la leteroj kiujn ŝi sendis al mi. Kun granda surprizo, mi ĝin retrovis en 90, libro aperinta okaze de ŝia 90-jariĝo en 2019. Temas pri respondoj al miaj demandoj: Kial, parolante pri ili, vi ĉiam aldonas la vorton Dolĉa al Patro, Patrino?

(Ŝajnis al mi gorda ripetado).

Kiel vi povis vivteni vin per marionet-prezentadoj?

Kion elvokas por vi hungaraj geografiaj vortoj?

Kio okazos al vi se vi restos sola, ĉar la domo en kiu vi loĝas apartenas al Filippo, kiu vendis ĝin per dumviva kontrakto.

Julia nature ci-diras al la personoj kiujn ŝi amas. Mi skribis al ŝi, ke mi ne kutimas pri tio, kaj tuj, pro respekto, ŝi uzis la viumadon.

“La futuro estas ĉiam mistera aŭ sekretema” ŝkribis ŝi preskaŭ fine de la letero.

Kara Julia, kiom ni estus esperinta dediĉi al vi floran kronon, kaj ne aŭdi kiamaniere vi – kaj Filippo tri tagojn poste – forlasis tiun mondon per la fi-kronviruso. Vi meritis pli fabelan vivofinon! Ni sekvu vian konsilon aperintan en 90 p.19: “Provu pensi pri bluaj floroj por esti ĉiam sen tristeco.”

Anne Jausions

Mi verkis tiun artikolon dum Pasko 2020 dum la tutmonda epidemio de kronviruso.



Julia, Anne kaj Horst en Braŝovo

Chère Anne!

Dès la première minute (à Braşov) tu m'as été très sympathique et cette sympathie n'a fait que croître ensuite. Nos dernières lettres ont renforcé mon amitié à ton égard. J'espère qu'il en est de même pour toi.

Tendre Père, Tendre Mère. D'après ce que je sais, ces mots superbes ne sont utilisés dans aucune autre langue que le hongrois. Ça ne manque pas d'intérêt, tu ne trouves pas?

Le mot «tendre» dans notre langue a un sens à part! Pour le miel aussi, on dit partout qu'il est tendre. En hongrois, on dit souvent «ma tendre patrie», «ma tendre langue maternelle» (la langue de mes parents), «mes tendres amis» (à coup sûr les personnes qui ont le plus de valeur – à mes yeux!). Tendre Anne!

Pourquoi as-tu du mal à imaginer que j'aurais aimé avoir 12 enfants?

J'aurais voulu être médecin pour enfants (pédiatre), mais on ne m'a pas donné accès à l'université. À cette époque (1949), la sélection était très sévère. Les enfants des ouvriers et des cultivateurs avaient la priorité! Mon Tendre Père était comptable, donc c'était un «intellectuel» travaillant assis dans un bureau. Après le baccalauréat, j'ai travaillé dans une usine de chaussures, comme ouvrière, puis dans les bureaux.

Dix années passèrent et j'ai tenté l'examen d'entrée au Théâtre de Marionnettes. Et je fus reçue! Suivirent vingt-cinq années de bonheur: jouer pour des enfants, pour moi ce n'était pas un travail, mais une grande joie!!!

Chère Anne!

Je suis très contente que tu aies lu le livre de mon frère: Konsilo de ateisto!

## LE PAYS DES SICULES

Renseigne-toi sur Székelyföld (le Pays sicule), cela me ferait plaisir. En fait, les Hongrois de Transylvanie les plus «anciens» sont les Sicules. Par exemple, il y a plus de 500 ans, mes ancêtres durent «déménager» à ARANYOS-SZÉK, près de Cluj où se trouvent encore leurs sept villages. L'un d'eux, Szentmihályfalva (Saint-Michel) fut celui où mon Tendre Père naquit. ARANYOS (qui signifie: or, doré) est le nom de la rivière qui les arrose. Elle traverse aussi ma petite ville natale de TORDA (Turda). Dans un autre village, BAGYON, est née ma grand-mère maternelle.

## LIBERTÉ DE RELIGION

Ma ville natale, TORDA, est connue parce qu'en 1568 on y a proclamé pour la première fois sur terre la LIBERTÉ DE RELIGION! L'an dernier, on a fêté un grand jubilé: il y a 450 ans fut créée officiellement – après les religions luthérienne-évangélique et calviniste réformée – la religion unitarienne. C'est la religion de ma famille.

Kara Anne!

De la unua minuto (en Braşovo) vi estis tre simpatia al mi. Poste tiu simpatio kreskis. Niaj lastaj leteroj fortigis mian amikan senton al vi. Mi esperas, ke ankaŭ vi same kaj simile sentas.

Dolĉapatro kaj Dolĉapatrino. Tiujn ĉi belegajn vortojn – laŭ mia sperto – en neniuj aliaj lingvoj oni uzas, nur en la hungara. Interese, ĉu ne?

La vorto “dolĉa” en nia lingvo havas iun specialan signifon! Ja ankaŭ por la mielo ĉie oni diras, ke ĝi estas dolĉa. En hungara lingvo ofte oni diras “mia dolĉa patrolando”, “mia dolĉa patrino lingvo” (gepatra lingvo), “miaj dolĉaj geamikoj” (= certe la plej valoraj personoj de la homaro – por mi!) Dolĉa Anne!

Kiel vi ne povis imagi, ke mi estus dezirinta havi 12 infanojn??? Mi volis iĝi infankuracisto (pediatro), sed oni ne akceptis min en la universitato. Tiutempe (1949) estis tre severa la elektado. La infanoj de laboristoj kaj kamparanoj havis unuaecon! Mia Dolĉapatro estis librotenisto, do, li estis “intelektulo”, laborante en ĉambro, apud skribotablo.

Post bakalaŭro mi laboris en ŝufabriko, kiel laboristino, kaj oficistino.

Pasis 10 jaroj, kiam mi provis ekzamenon ĉe la Pupteatro, kaj mi sukcesis. Tiel sekvis 25 feliĉaj jaroj: ludi por infanoj ne estis laboro – por mi, sed grandega ĝuo!!!

Karulino!

Mi tre ĝojas, ke vi legis la libron de mia frato: Konsilo de ateisto!

## SIKULLANDO

Mi ĝojus, se vi informiĝus pri Székelyföld. Fakte, la sikuloj estas la plej “malnovaj” hungaroj. Ekzemple antaŭ pli ol 500 jaroj, ankaŭ niaj familiaj prauloj estis “translokiĝintaj” al tiel nomata ARANYOS-SZÉK, proksime de Kluĵo, kie ankaŭ nun troviĝas la sep vilaĝoj. Unu el tiuj sep, Szentmihályfalva (sentmilhaj-falva) estas la naskiĝvilaĝo de mia Dolĉapatro. ARANYOS (ora, orumita) estas la nomo de la rivero, fluanta inter tiuj vilaĝoj. Ĝi trakuras ankaŭ mian naskiĝurbon Torda (Turda). En alia vilaĝo BAGYON (badjon) naskiĝis mia patrino avino.

## LIBERECO DE RELIGIO

Mia naskiĝurbo TORDA famas pro la fakto, ke en 1568 en tiu urbo estis proklamita la unuan fojon en la tuta mondo sur nia terglobo la LIBERECO DE RELIGIO! Pasintjare estis granda festo-jaro, antaŭ 450 jaroj estiĝis oficiale – post la luterana-evangelia kaj reformita-kalvinana protestantaj religioj – la unitaria religio. Nia familio apartenas al unitarianoj.

# Eugène de Zilah



*Atingis nin la ŝoka informo de Bruno Masala:*

Tre estimataj gekolegoj,

Nia redaktoro, aŭtoro, amiko, nia kara Jenio forpasis vendrede, 2an de oktobro, plena de la espero retrovi sian amatinon, Lena.

*Tuj mi reagis:*

Kun profunda ĉagreno ni eksciis pri la forpaso de Eŭgeno.

Lastatempe ni ne plu aŭdis novaĵojn de li, tamen ni povis esperi revidi lin almenaŭ

en virtuala kontakto.

Kion skribi? Ni komencis relegi liajn verkojn. Kiom vasta kulturo, trovante siajn radikojn en tre diversaj fontoj! Kaj ne nur: kiom da pripensoj ĉirkaŭ tiuj kulturoj! Kiom da profundaj analizoj, kiuj ankaŭ igas nin starigi nian propran pensadon, serĉi mem nian propran vojon!

Ni sentas nin senvortaj antaŭ tia eksterordinara homo.

Ni ŝatus citi lin, ne kapablante mem vortumi ion sufiĉe bonan. Sed kion citi? Tiom da interesaj memorspertoj, ĉu en *Kaj kiu pravas*, ĉu en *Vivi sur barko*, ĉu en la kronikoj de *La Gazeto*, kiun li dum 34 jaroj vivigis.

Ni sentas grandan perdon de elstara figuro de la esperanta kulturo.

Sincerajn kondolencojn al liaj familianoj!

Claude Nourmont

*Kaj jen Bernard Behra aldonis:*

Mi salutas ĉiujn mortintojn kaj nun nian eminentan amanton de Esperanto: D-ro Eugène de Zilah.

Mi substrekas ke tiu homo, certe verkisto, filozofo, humanisto, libera pensulo, pli ol liberecano, do laŭ mi individua liberecano, faris el sia propra vivo mem verkon.

Eugène maksimume kaj ofte sen limoj ĝuis pri ĉio, kion la vivo permesas dum tiu ne-vortigebla, do samtempe mirinda terura kaj bedaŭrinde kelkfoje abomena, spertado de la konscia individua ekzistado.

Forta karaktero kaj personeco, Eugène ĉiam malakceptis, kaj eĉ povis kolere ribeli, kiam li sentis ian ajn premon por malebligi lin pensi kiel li volis, iri kien li decidis aŭ fari kion li elektis, same li tute ne akceptis ian ajn devigojn, kiam li ne tute libere mem, kaj nur li mem, decidis tion.

La Esperanto-komunumo grave ŝuldas al Eugène de Zilah en diversaj kampoj nome literaturo, humanismo kaj filozofio. Oni por eterne kalkulos lin inter niaj diligentaj kolegoj, kiuj tiom faris por vivi Esperanton ĉefe ĝian spiritecon de libereco, amo de ĉiuj kulturoj kaj lingvoj, do ĉio kio ĉefe koncernas la homojn, la homecon kaj la homaron.

Al la filo, bofilino, nepoj kaj al ĉiuj, kiuj amis Eugène de Zilah, mi prezentas miajn kondolencojn.

Bernard Behra

Suite de la page 27

Chère Amie !

Je suis propriétaire d'un deux-pièces à Cluj (microscopique, d'après Filippo ) où je pourrais habiter, au cas où ce ne serait pas moi, mais Filippo, qui mourrait le premier. L'avenir est plein de mystères et de secrets.

J'essaierai de te faire envoyer un exemplaire de KVODLIBETO et le CD de L'OURS ET LE PETIT COCHON.

Chère Anne!

Je regrette qu'aucun de vos descendants n'ait appris l'espéranto. Peut-être un des petits-enfants s'y intéressera-t-il? Ce serait dommage que toute ta riche bibliothèque finisse à la poubelle.

Et chez ton mari, il n'y a pas non plus un seul espérantiste? Je vous salue affectueusement tous les deux!

Kara Amikino!

Mi havas duĉambran propran loĝejon en Kluĵo (laŭ Filippo: mikroskopa loĝejo), kie mi povus loĝi, se ne mi estos la unua, sed Filippo, kiu forpasos. La futuro estas ĉiam mistera aŭ sekreta.

Mi provos sendigi al vi ekzempleron el KVODLIBETO kaj ankaŭ el la KD pri URSIDO KAJ PORKETO.

Kara Anne!

Mi bedaŭras, ke neniuj el viaj posteuloj lernis Esperanton. Eble unu el la genepoj interesiĝos?

Estus domaĝo, se viaj multaj valoraj libroj atingus rubujon.

Ĉu ankaŭ inter parencoj de Claude eĉ unu esperantisto ne troviĝas?

Kore mi salutas vin ambaŭ!



## NOVE ĉe Vinilkosmo

### TIM el Kolombio

Nova voĉo venis pliriĉigi la buntecon de Esperanto-muziko ĉe Vinilkosmo. TIM (Timothy Gallego) el Kolombio verkas kaj komponas Esperanto-kantojn jam de pluraj jaroj.

De la somero 2018 post IJK en Badajoz Tim decidis paŝon post paŝo labori por esperanta muziko, kaj por tio li planas fari muzikvideojn kaj registradi por publikigi siajn proprajn kantojn. Ekis kunlaboro inter Tim kaj Vinilkosmo kaj Tim registris personan projekton de albumeto pere de sia hejmsstudio en sia ĉambro.

Tiu unua albumeto enhavas 5 titolojn, la temoj de la kantoj estas tre intimecaj laŭ alternativa popstilo – sendependa roko (Indie rock).

La 24an de aŭgusto okazis la oficiala apero de la bita albumeto *Vaganto* de TIM el Kolombio ĉe VINILKOSMO.

Premiera muzikeldono de tiu ĉi nova juna artisto kiu regalias nin per belega voĉo kaj fajna ludado de gitaroj en sendependaj rok- kaj alternativa pop-stiloj.

Estis longa kaj malfacila labor-aventuro naŭmonata, ne en plej bonaj kondiĉoj (Kronvira krizo, teknikaj problemetoj, ktp.) tamen la albumeto aperis kaj ni ne dubas ke tiu muzika juvelo plaĉos al vi.

Por konatiĝi kun la artisto ni invitas vin legi lian artistan paĝon ĉe <https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/popo-roko-hiphopo-elektronik/tim.html>

Legu pli, vidu fotojn kaj prezentvideon pri la preparo de la albumeto ĉe <https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo.html>

Homoj povas malkovri, aŭskulti fragmentojn kaj mendi la 6 titolan albumeton ĉe <https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/popo-roko-hiphopo-elektronik/tim/1-vaganto.html>

Oficiala apero de la bita unuopaĵo kaj muzikvideo *La Pordo*, de Ale Kosabela la 18an de februaro 2020

Okazis la oficiala apero de la bita unuopaĵo kaj muzikvideo *La Pordo* de Ale Kosabela ĉe VINILKOSMO.

Vera koncentriĝo de internacia kunlaboro por urĝa kaŭzo...



Legu pli pri la apero de la dutitola unuopaĵo kaj video ĉe:

[https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/140-apero-de-la-bitu-unuopaĵo-kaj-muzikvideo-\"la-pordo\"-de-ale-kosabela,-la-18an-de-februaro-2020.html](https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/140-apero-de-la-bitu-unuopaĵo-kaj-muzikvideo-\)



Grupa foto okaze de la lasta registrosesio kun la helpo de Matheus Arantes por la filmado ĉe la Suda Kanalo (foto:Vinilkosmo)

La 10an de oktobro 2020, okazis la oficiala apero de la bita viva albumo *Ĉiuj ni amegas Usonon* de La Perdita Generacio ĉe Vinilkosmo.

Tiu ĉi nova albumo estis registrita dum koncerto de La Perdita Generacio en la Nordamerika kongreso en Seatlo (Usono) en 2018. Estas la unua viva albumo eldonita ĉe Vinilkosmo.

La realigado sukcesis dank' al la kunproduktado inter Esperanto-USA, LPG kaj Vinilkosmo. La preparoj por tiu eldono estis longaj kaj komplikaj sed finfine la kunlaboro estis sukcesa kaj ĉio finfine sukcesis kaj nun eblas ĝui la vivan kaj mojosan etoson de tiu memorinda koncerto kiu enskribiĝos en la por ĉiamaj verkoj de esperanto-muzik-kulturo.



Por scii pli, bonvolu iri ĉi tien :

<https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/162-oficiala-apero-de-la-bitu-viva-albumo-ĉiuj-ni-amegas-usonon-de-la-perdita-generacio.html>

Flo!

nome de la Vinilkosmo-teamo



Tim (Timothy Gallego)



Marcel, Manuela, Pilar kaj Bernhard.  
Foto: University of St Andrews.

## Transnaciaj studoj

Britio (Skotlando)

### Progreso ĉe la Universitato de St. Andrews

St. Andrews estas la plej renoma kaj longviva universitato en Skotlando.

Prof. Bernhard Struck informas, ke la Centro de Esperanto-studoj ĉe la Universitato de St. Andrews bone progresas. Ĉiuj tri unuajaraj doktoriĝaj studentoj faris konsiderindan progreson: Marcel Koschek, kiu esploras pri Varsovio kiel ĉefloko, lokaj kaj transnaciaj retoj, kun ĉefa fokuso al TEKA kaj kuracistoj; Pilar da Lamo Requero pri Katalunio kaj la Ibera Duoninsulo,

Esperanto kaj naciismoj en tiu regiono; kaj Manuela Burghilea, kiu faras ciferec-ajn esplorojn anstataŭ surloka laborado en Rio-de-Ĵaneiro, ĝis sekura vojaĝado eblos.

La grupo organizis iom da kunvenoj antaŭ la kronviruso, kaj poste rete per Zoom kun la Glasgova Esperanto-klubo, bonvenigante prezenton de Guilherme Fians en Manĉestro.

Mallonga intervjuo pri la agado de la grupo aperis en *Libera Folio* (vidu sube).

ism-c-1880s-1930/

### Transnacia historio

Naskiĝis en decembro 2020 retejo de la teama projekto «Esperanto kaj Internaciismo», gastigata de la Universitato de St Andrews. La projekto estas bazita en la Instituto por Transnacia kaj Spaca Historio de St Andrews kaj celas esplori la fruajn jardekojn de la Esperanto-movado (ĝis la jardeko 1920). Parto de la projekto temas ankaŭ pri la revigliĝo de la Esperanto-movado en la nuntempo.

La membroj de la teamo pluestas profesoro Bernhard Struck kaj la doktoriĝantaj studentoj Manuela Burghilea, Marcel Koschek kaj Pilar Requejo de Lamo. La areoj kovritaj de iliaj esploroj rilatas ĉefe al Bohemio, Skotlando, Hispanio, Pollando kaj Brazilo.

En la retejo regule publikiĝos blogaĵoj, mapoj kun lokaj esperantistoj aŭ partoprenintoj de internaciaj kongresoj, biografioj de pioniroj de la Esperanto-movado kaj intervjuoj kun nuntempaj esperantistoj.

Vizitu la novlanĉitan retejon ĉe  
<https://www.transnationalhistory.net/esperanto/en/705ea-home/>

Manuela BURGHELEA  
paru dans IPR 1/2021

Peris Mireille GROSJEAN

Legu pri tio ĉe:

<https://www.liberafolio.org/2020/05/18/esperanto-allogas-esploristojn-pri-internaciismo/>  
<http://standrewstransnational.wp.standrews.ac.uk/research/esperanto-and-international->

## INK-konkurso

**Interkultura Novelo-Konkurso (INK)** estas konkurso organizata de Akademio Literatura de Esperanto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio, celanta instigi aktualan novelan kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj. Sama temo, malsamaj vidpunktoj, malsamaj historioj...

La temo de la konkurso estis voĉdonita rete: **“KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin”**. Aŭtoroj estas nun invitataj verki novelojn pri ĉi tiu temo kaj sendi ilin per reta formularo antaŭ la 20-a de junio 2021.

Pensu: la nova koronaviruso, kiel ĝi ŝanĝis vian vivon aŭ la mondon? Per ĉi tiu temo, vi povas trovi inspiron por skribi fikcian rakonton okazantan en la pasinto (dum la unuaj – kelkfoje frenezaj – monatoj de la pandemio), nuntempe (kiam pandemio iĝis preskaŭ kutima afero de la vivo) aŭ en la estonto (post jaroj, jardekoj aŭ eĉ pli... kia estos nia mondo?)

INTERKULTURA  
**INK**  
NOVELO-KONKURSO



## Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2020

**D**imanĉe la 6-an de julio, kadre de la **Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020)**, en bunta kaj elstare kunmetita virtuala festo-ceremonio, la Komisiono pri Belartaj Konkursoj de UEA diskonigis la rezultojn ĉijarajn. Miguel Gutiérrez Adúriz, Sekretario de la Belartaj Konkursoj bonvenigis la spektantojn kaj anoncis, ke la konkurson partoprenis 151 verkoj el Afriko, Azio, Eŭropo kaj Ameriko. La prezidanto de la Belartaj Konkurso, Miguel Fernández en malferma parolado anoncis la baldaŭan aperon de *Antologio de Mikronoveloj* partoprenintaj en la Belartaj Konkursoj, kiuj fariĝas 70-jaraj en 2020. Omaĝe al ĵus forpasinta poetino Júlia Sigmond li deklamis ŝian poemon Doloro. La tutan ceremonion eblas re-spekti en la kanalo de UEA en Jutubo, UEAviva: <https://youtu.be/t8l1nRyo6a8>

La diversajn premiojn disdonitajn anoncis laŭvice membroj de la diversaj juĝantaj triopoj.

Jen la tuto el la premioj:

### Branĉo Poezio

**Unua premio:** *Mia kvaropo admirinda* de Nicolino Rossi, el Italio.

**Dua premio:** *Ek sor* Evgenij Georgiev, el Kazahio.

**Tria premio:** en egaleco por jenaj tri verkoj:

*La renkonto kun la trompo* de Tiberio Madonna, el Italio;

*Pri-kronvirsura kroniko...* de Sergo Sir', el Francio;

*La nigra dio* de Jesper Lykke Jacobsen, el Francio.

### Branĉo Prozo

**Unua premio:** *Finjo* de Vladimir Opletajev, el Rusio.

**Dua premio:** *Muŝribelo* de Ewa Grochowska, el Francio.

**Tria premio:** *Nova Dekameron* de Paulo Sérgio Viana el Brazilo.

### Subbranĉo Mikronovelo

**Unua premio – Premio Paula Adúriz:** *La stranga butikumo* de Francisco Javier Moleón el Hispanio.

### Branĉo Teatraĵo

Neniu premio estis aljuĝita.

### Subbranĉo Monologo aŭ Skeĉo

**Unua premio – Premio María Cuevas:** *Ne tute, nur duone* de Tiberio Madonna el Italio.

### Branĉo Eseo

**La unua premio – Premio Luigi Minnaja:** ne aljuĝita.

**Dua premio:** *Komparo inter Esperanto kaj Okcidental* de Emanuele Bovio-Regano el Italio.

**Tria premio:** ne aljuĝita.

Gajnis honoran mencion la verkoj:

*Halka kantas esperante* de Roman Dobrzyński el Pollando.

*De hilelismo al Homaranismo: Ĉu nova hipotezo?* de Roberto Lloancy el Francio.

### Infanlibro de la Jaro

La premio estas aljuĝita al la Eldonejo Esperanto-Asocio de Britio pro la verko *La krubalo* de Julia Donaldson kaj Axel Scheffler.


Gratulojn al ĉiuj partoprenintoj !

Mallonga ligilo por tiu ĉi komunikado:  
[uea.org/gk/903a1](http://uea.org/gk/903a1)

Info: *Gazetara Komunikado de UEA* n-ro 903 (2020-09-06)

La tekstoj havas maksimume 12 000 karaktrojn (proksimume 6 paĝoj). Ne estas minimuma longeco. Poste, interkultura ĵurio taksos la novelojn kaj anoncos gajnintojn dum la 107a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio en Montrealo, somere 2022. La aŭtoroj de la tri gajnintaj noveloj ricevos premion de 500, 300 kaj 200 eŭroj, respektive. Finalistajn novelojn oni povos legi en rete publikigota novelaro.

Ĉu vi ŝatas literaturon, novelojn, konkursojn, INK-on? Ni volas aŭdi pri vi!  
<https://www.akademio-literatura.org/ink>






**REPORTÉ**  
**du 22 au 29 mai 2022**

# Congrès interassociatif de l'espéranto en France

~~13-16 mai 2021~~, à Trélissac (près de Périgueux)

## BIENVENUE DANS LE PÉRIGORD !

En 2021, le **congrès interassociatif de l'espéranto en France** aura lieu dans le verdoyant **Périgord**, connu pour ses truffes, sa cuisine, ses mille châteaux et sa douceur de vivre dont jouissent les hommes depuis l'âge des cavernes.



Tous les **moyens de transport** desservent Périgueux (gare SNCF, aéroport, lignes d'autocar, autoroute).

Le congrès aura lieu dans le **foyer socio-culturel de Trélissac**, un très grand bâtiment offrant de nombreuses salles, dont certaines très grandes, pour des **réunions** de groupes grands et petits.



En effet, ici vous pourrez visiter avec nous la **grotte de Lascaux**, découvrir la vieille ville de **Périgueux** et les **sites gallo-romains**, vous promener sur les **bords de l'Isle**, faire connaissance avec les **châteaux** de la région, **bien manger** et beaucoup plus encore.



De **nombreuses activités** sont prévues, des **conférences, ateliers, excursions**, préparation aux **examens, concert, repas**, sans oublier les **réunions**, officielles et autres, d'Espéranto-France et d'autres groupes.

## ASSEMBLÉE GÉNÉRALE d'Espéranto-France le 15 mai 2021

L'assemblée générale  
d'Espéranto-France aura lieu  
en ligne,  
le samedi 15 mai 2021  
à 10 heures.



Venez dans le Périgord,  
vous n'allez pas vous ennuyer !



La **convocation à l'A.G.** ainsi que le **bulletin de vote** seront envoyés par courrier postal à tous les membres au plus tard trois semaines avant la réunion.

Si vous n'avez pas encore renouvelé votre **adhésion à Espéranto-France** pour l'année 2020-2021, vous pouvez encore le faire en allant sur notre site : <https://esperanto-france.org/adherer>